

Monata revuo de la grupo B r u g g e .Sekcio de Flandra
Ligo Esperantista.

Prezidanto : Drs F. Roose, J. & N. Sabbest, 12, Brugge-Tel. 01931

Sekretarioj : Iserentant Roger, Steenweg op Blankenberge, 26,
Brugge

Interŝanĝo : Maertens Grég. Nieuwstraat, 54, Assebroek

Poŝtkonto : 291429 - Maertens Grég. Assebroek.

LA LUNO - SUN-kaj LUNEKLIPSOJ.

La luno, kolonio de la tero, estas la plej grava luno de la noktsseleco. Ĝi estas pala torĉo kiu ricevas sian lumon de la suno. Ĝi humile anstataŭas la tagdiinon kaj ŝajnas diri al ni ke, la suno, kiam ĝi jam malaperis sub nia horizonto, tamen ĉiam brilas en la aerspaco, sed, per la tero mem, kaŝita al nia rigardo. El ĝiaj ŝajnfikuroj oni jam scias el la plej fruaj tempoj ke ĝi estas bulforma kaj ke la noktradiojn, kiujn ĝi elverŝas sur la dormetanta tero, ĝi ricevas de la suno. La luno moviĝas en proksimume unu monato ĉirkaŭ la tero laŭ la sama maniero kaj samaj kondiĉoj kiel la tero je ĝia jara moviĝo ĉirkaŭ la suno. Kelkfoje ĝi estas ĝuste antaŭ la suno kaj tiam kaŭzas suneklipson sur tiuj partoj de la tero kie ĝia ombrokonuso tranĉas la teron. Kelkfoje ankau ĝi iras, vidata el la suno, post la tero, tio signifas, ĝi venas au tute, au parte, en la ombrokonuso kiun la tero mem kaŭzas.

En tiu kazo ĝi estas tute au parte kaŝita. Ĝiaj ŝajnfikuroj estas tute precizataj per la reciproka sintenado de suno, tero kaj luno. Kiam ĝi venas inter la suno kaj la tero, ni ne vidas ĝin ĉar tiam ĝia malhela parto estas turnata al ni. Tiam ni havas "nova luno".

La suno kaj luno staras proksimume en la sama direkto al la ĉielo. Se la linio, kiu iras de la tero al la luno, staras vertikale sur la linio kiu iras de la tero al la suno, tiam ni havas "la unua au lasta kvarono", ĉar tiam la duono de la al ni turnita parto estas lumigita. Se la luno staras ĝuste al la kontraŭa parto de la ĉielo, kie estas la suno, tiam la al ni turnita parto de la luno estas lumigata de la suno; tiam ni havas "plena luno", kaj la luno staras tiam dum la nokto kiel eble plej alte super la horizonto. La luno turniĝas ĉirkaŭ la tero en unu elipsvojo kiu ne multe diferencas de la cirklorondo, kaj sur distanco de 384,400 kilometroj. La rondo de la vojo estas 2,400 kilometroj. Tiu vojo estas trakurata en 27 tagoj, 4 horoj, 43 minutoj kaj 17 sekundoj. La rapideco de la luno en ĝia vojo do estas 1 kilometro po sekundo. La suno ĉiam turnas ĝian saman flankon je ĝia moviĝo al la tero. La unuaj observantoj kiuj rigardis dum tiu trankvila horo al la ĉielo, kiam la torĉo elradias sian malhelan lunon nokte, jam vidis ke ĝia supraĵo estas kovrita de strangaj desegnoj. Oni povas diri ke la astronomio, ekestis post la observo de la luno. Davas esti forpasintaj jam miljaroj de post kiam oni observis tiun strangan vizaĝon kiu estas direktita al la tero kaj ĉiam restas sur la sama loko kaj, el kiu ŝajnas ke ĝi ne estas provokita el la nuboj au vaporoj sur la luno, sed ke ĝi estas propra al la fundo de la luno kiu estas tute neŝanĝebla. La unua lunarkarto estas certe prezentado de konfiguracio ĉar la lokoj de la makuloj tre bone akordiĝas kun tiuj de la okuloj, nazo kaj buŝo. Tia similo estas nur sekvo de la hazara formo de la lunsupraĵo. Ĝi cetere tuj malaperas kiam oni observas lalonon per teleskopo. Oni eble ne povas imagi ke la tero, vidata de malproksime, brilas kun tia brilo kiel la "plena luno". Sed tamen estas fakte.

La luno ne estas blanka, sed flavgriza. Nenia alia ĉielkorpo estas tiel proksima al la tero ol la luno. Ĝi akompanas ĝin en ĝia vojo ĉirkaŭ la suno kaj ĝi estas nesepareble kunligita al niaj aventuroj. La distanco de 304.400 kilometroj kiuj separas ĝin de la tero estas nur paŝo en la universo. Telegrafita komunikado de la tero al la luno jam alvenis al la luno en 1 - 1/2 sekundo. Kanonkuglo jam alvenis en 9 tagoj; rapidvagonaro bezonus 8 monatojn kaj 26 tagojn. La plej multaj homoj sur la tero iris piede la vojon kiu disigas nin de la luno. Ponto kiu havus 30 fojojn la longeco de la diametro de la tero estus sufiĉe longa por ligi la lunon kun la tero. Sur la supraĵo de la luno troviĝas multaj montoj kaj oni jam povas ekzakte diri la altecon de ili. La plej alta monto havas altecon de 3.000 metroj. Sur la luno ne estas vaporoj. Do, neniam oni havas nebulojn sur la luno nek pluvon aŭ neĝon. La plej imponaj aperaĵoj al la ĉielo estas la suneklipsoj. Ne plu estas mirebla ke en la tempo kiam oni ne ankoraŭ sciis ke tio estas sekvo de iu tempa kovriteco de la sun-disko per la luno, kaj urĝturno de nia satelito, oni havis iun sanktan timon por suneklipsoj kaj vidis en ĝi la Difingron kaj la esprimon de Lia kolero pri la malbona konduto de la homoj. Suneklepo okazas kiam la suno, je ĝia moviĝo ĉirkaŭ la tero, venas inter la luno kaj la tero. Se la vojo de la luno ĉirkaŭ la tero troviĝas en la sama ebena kiel la vojo de la tero ĉirkaŭ la suno, tiam ni havus eklipson je ĉiu "nova luno". Sekve de la delivro de la lunvojo rilate al la tero, okazos nur tiam suneklipsoj kiam je "nova luno" la suno troviĝas ĝuste en unu el la krucpunktoj, tiamaniere ke la tero, suno kaj luno estas sur horizontala linio. Ĉar la luno ne priskribas cirklojn, ĉirkaŭ la suno sed elipson tial ke foje ĝi estas pli proksima kaj foje denove pli malproksima de la tero, ĝia ŝajndiametro estas foje pli granda kaj foje denove pli malgranda ol tiu de la suno. Tiam en la unua kazo, la luno kovras la tutan sundiskon kaj en la alia kazo, unu sunringo restas libera. En la unua kazo ni havas kompletan suneklipson en la lasta ringforma eklipso. Se je "nova luno" la luno ne venas inter unu de la krucpunktoj, sed en ĝia proksimo, tiam la luno nur iras je iu parto de la sundisko kaj okazos parta suneklipsoj. Je kompleta suneklipsoj, nur por cetera parto de la tero, la suno estas kovrita per la luno. Por aliaj lokoj sur la tero, la luno nur kovras parton de la suno dum ke en aliaj lokoj la luno tute ne kovras la sunon. Suneklipsoj do estas nur videblaj sur tre malgranda parteto de la tero. Luneklipsoj okazas kiam je "plena luno" la luno troviĝas en la ebena de la tero. Ankaŭ en tia okazo la suno, tero kaj luno denove troviĝas en horizontala linio sed nun la tero troviĝas inter la suno kaj luno tial ke la luno troviĝas en la ombrokonuso de la tero. Estas tre granda diferenco inter sun- kaj luneklipsoj: suneklipsoj estas por kelkaj sur la tero nenio alia ol kovriteco de la sundisko; je luneklipsoj la luno estas komplete malhela kaj estas por ĉiuj en la universo malhela.

Kvankam de en periodo de 18 jaroj kaj 11 tagoj ĉiuj sun- kaj luneklipsoj revenas, okazas 29 luneklipsoj kaj 11 suneklipsoj kaj oni en tiu periodo en ceteraj lokoj de la tero rimarkas pli da lun-ol suneklipsoj. La diametro de la luno estas 4 fojojn pli malgranda ol tiu de la tero.

Rosa Juŝion.

Laŭ la verko: "Hemel en Aarde"
de Flammarion.

GESAMIDEANOJ !!

Por riparado de viaj ŝuoj, nur unu adreso:

Hubert Van Roesebeke - Calvaŝiebergstraat, 2, Brugge.

5 % da rabato!

Krucvortenigmo : (15 puentoj) 1/4 puento po vorto + 3 p. por tuta ekzakta solvo.

1			2			3		4			5			6
			7					8						
			9					10						
11	12					13	14				15	16		
17			18			19		20			21			22
			23					24						
			25					26						
27	28					29	30				31	32		
33			34			35		36			37			38
			39					40						
			41					42						
43						44					45			

Horizontale : 1. Didomo (r) - 3. sovaĝa besto - 5. publika vendado (r) - 7. honortitolo - 8. speco de vento (r) - 9. birdo - 10. senĉesa - 11. rita vesto (r) - 13. fordoni valoraĵon - 15. ŝtato - 17. ligna konstruaĵo (r) - 19. birdo (r) - 21. parto de la kapo (r) - 23. koralsulo - 24. svelaĵo (r) - 25. pruvilo (r) - 26. geometria linio (r) - 27. dezerto (r) - 29. konkmlusko - 31. konstelacio (r) - 33. insektoj - 35. turka ministro (r) - 37. enloĝanto de parto de Jugoslavujo (r) - 39. plej malgranda ero de materio - 40. birdo (r) - 41. urbo kie estas Esperanto domo (r) - 42. insekto - 43. speco de glavo (r) - 44. granda muŝo (r) - 45. kanapo (r).

Vertikale : 1. anĝelo - 2. kampa vegetaĵo (r) - 3. restadejo - 4. montri enuon - 5. perfekte havigi al si (r) - 6. manĝebla radiko - 12. kunaĵo de ŝio (r) - 14. eta peltkvarpedulo (r) - 16. cindrokolora - 17. araba mantelo (r) - 18. rusa frandaĵo (r) - 19. eta aleo - 20. objekto por sin amuzi - 21. vespero - 22. tendenco (r) - 28. virinejo (r) - 30. flava juvelŝtono (r) - 32. floro - 34. severe kontroli (r) - 34. raba besto (r) - 35. libroparto - 36. foksimila mambesto (r) - 37. energie labori por efektivigi celon (r) - 38. vira kapvesto (r).

Remarko : Oni sendu la solvojn antaŭ 15.3.47 al la prizorganto de la rubriko, Iserentant R., Steenweg op Blankenberg, 86, Brugge.

Aŭstria Esperanto-Kongreso : okazos la 29 - 31 de Aŭgusto 1947, en Kufstein, Tirolo. Pro morala apogo de la Aŭstria Esperanto-movado flanke de la eksterlandaj organizoj por pruvi al la ne-esperantista publiko la disvastiĝon de Esperanto tra la tuta mondo, ni petas ĉiujn E. organizojn, grupojn, instancojn kaj la ĝesperantistaron ĝenerale, ke ili bonvolu sendi salutleterojn aŭ kartojn al :

Esperanto-Kongreskomitato, prezidanto D-ro Alfons Huber, Kufstein, Zell, Tirolo, Aŭstrio.